

# **ESPERANTO**

## **KAJ KULTURO**

### **Internacia Pedagogia Revuo**

Aperas monate sub la aŭspicio de la  
FRANCA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ  
(G. E. E.)

Redakto - Sekretario :

D-ro Andreo ALBAULT  
11, rue des Feuillants  
Toulouse (Francio)



Eldono - Direktoro :

H. MICARD, Emerita Instruisto  
Epineux-le-Séguin (Mayenne)  
Francio

N° 4  
APRILLO  
1957

Jara abono : 400 fr. fr., pagenda en Francio al  
Edmond BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.  
Post-ĉek-konto : 1438-67 Nantes ;  
aŭ al la landaj perantoj de I.P.R. (vidu 2-an kovrilpaĝon)  
aŭ al la landaj perantoj kaj delegitoj de U.E.A.



## Informoj el niaj Asocioj

Ni opiniis ke la aperigo de la jenaj informoj utilos al niaj legantoj.

I.L.E.I.

**Funkciuloj** por la periodo 1955-58 :

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, 70, Av. Victor-Ségoffin, *Toulouse*, Francio.

Sekretario, Kasisto, Gvidanto de Centra Oficejo : F-ino Violet C. NIXON, 183, Woodlands Park Road, Bournville, *Birmingham*, 30, Anglio.

Konsilantoj : S-roj HEITMÜLLER, SVANTESSON, TACCANI.

**Membro-Asocioj** :

Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Suomio, Svedio.

**Aktivaj reprezentantoj en aliaj landoj** :

Aŭstralio, Belgio, Danlando, Irlando, Izraelo, Japanio, Jugoslavio, Kanaria Insularo, Maroko, Norvegio, Portugalio, Urugvajo, Usono.

G.E.E. (800 anoj) (franca asocio) .

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, Licea Lingvo-instruisto (adreso supre).

Generala Sekretario : S-ro F. THÉBAUD, C.C. Jeunes filles, *Caudry* (Nord).

Kasisto : S-ro E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, *Baugé* (M.-et-L.).

S.B.E.T. (192 anoj)

Prezidanto : S-ro A.J. HICKS el Parkstone.

Sekretario-Kasisto : F-ino Violet C. NIXON (adreso supre).

LANDA SEKCIO HESSEN de « Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj » (42 anoj)

Sekciestro : Kurt SCHÖNRICH, Hallgarter Str. 10, *Wiesbaden*.

INSTRUISTA SEKCIO ĉe « Slovenia Esperanto-Ligo » (... anoj).

Prezidantino : Sonjo TAVČAR.

Sin turni al Sek. de S.I.E.L. : Marinko GIVOJE, Poŝtfako 275, *Ljubljana*.

E.U.G.I. (135 anoj) (germana asocio)

Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto : S-ro Heino HEITMÜLLER, (23) *Bremer* 8, Waller Heerstrasse 134.

AŭSTRALIA ESPERANTO-SOCIETO DE INSTRUISTOJ.

Prezidantino : D-ro SUMMERS.

Sekretariino : Gertrude POLLARD.

« GRAJNOJ EN VENTO », la *Tutmondaj Interlernejaj Rondo* Marcel ERBET-  
TA, rue des Pins, 66, Bienne-Biel 7, Svislando.

INFORMOJN pri aliaj landaj edukistaj asocioj ni volonte publikigos.

## ATENTU

Post Montevideo, ni devas repensi niajn metodojn. Nedubeble ni devas penetri en ĉiujn kulturajn mediojn aŭ **perei**.

Unu el la rimedoj penetri en tiujn mediojn estas en viaj manoj, karaj legantoj, kaj plie vi mem rikoltos la frukton de via laboro : traduku el la esperantaj gazetoj ĉiujn artikolojn, kiujn vi opinias interesaj por iu gazeto nacilingva... ĝuste elektita.

Tiel vi konigos nian lingvon en larĝaj tavoloj kaj certe vi ricevos nur helpon de koncernaj redakcioj, ĉar vi servos ilin per interesaj artikoloj de alilandaj aŭtoroj.

\*\*

*Traduko kaj Publikigo*, en la pedagogia gazetaro, de la artikoloj de I.P.R. estas permesata. Nepre estu indikataj : 1° la aŭtoro (se eble lia logloko) 2° la fonto (lasante la titolon en Esperanto kaj jene : « Internacia Pedagogia Revuo », jaro, numero, paĝoj).

Ni petas vin sendi 2 pruvekzemplerojn al la redakcio (ni transsendos unu al la aŭtoro).

# ESPERANTO KAJ KULTURO

## Internacia Pedagogia Revuo

**Redaktejo** : D-ro ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.

**Administrejo** (abonoj, ktp.) : E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M-et-L.), Francio.

**Eldonejo** : H. MICARD, Emerita Instruisto, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Francio.

F. Nouljan

## Tasko de la Jubilea Kongreso

La Loka Kongresa Komitato de la Ora Jubilea Kongreso en la jaro 1937 en Varsovio ĵetis en la mondon, kiel devizon de la Kongreso kaj de la tuta jubilea jaro la vortojn : « ESPERANTO EN LA LERNEJOJN ». La ĉi-jara Jubilea Kongreso en Marseille devas fari la samon.

La Kongreso en Varsovio unuanime akceptis rezolucion, kiun al ĝi prezentis « Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistoj ». (Vidu « Internacia Pedagogia Revuo », 1937 n-ro 6 p. 106), en kiu ĝi proponas al ĉiuj registaroj de la mondo la akcepton de la « Interŝtata Esperanta Akordo pri Deviga Instruado de Esperanto en la Lernejoj ».

La Kongreso komisiis la Lokan Kongresan Komitaton funkcii dum unu jaro kiel Realiga Komitato. Pri sia grandega kaj modela agado tiu Komitato raportis al la 30-a Univ. Kongreso en Londono 1938. (Vidu « Internacia Pedagogia Revuo », 1938, n-ro 4, p. 61, kaj n-ro 5, p. 74).

D-ro Edmond PRIVAT en la II-a volumo de la « Historio de la Lingvo Esperanto » skribas : « En la usona ŝtato Maryland en 1908 kaj en insulo Samos en 1910 instruado estis enkondukata en lernejojn oficiale ». Plue li raportas pri deviga aŭ nedeviga instruado de Esperanto en Albanio, Bulgarujo, Brazilo, Belgio, Ĉinujo, Genevo, Granda-Britlando, Hispanujo, Hungarujo, Francujo, Italujo, Japanujo, Nederlando, Portagulo, Siberio, Ĉeĥoslovakio, Germanujo. Li forĝesis menciis, ke ankaŭ en Aŭstrio, Grekujo, Rumanujo kaj Turkujo estis Esperanto enkondukita oficiale en la lernejojn. Ĉiuj ĉi ŝtatoj ne bezonis specialan Lernejan Interŝtatan Esperanto-Akordon, ili agis tute memstare. Ĉe la traktadoj pri interŝtataj akordoj ĉiam devas labori diplomatio. Tiuokaze ofte naskiĝas postkulisaj intrigoj. Do, nun ni ne estu tro saĝaj, ni ne komplikigu la aferon, se ĝi povas esti simpla. Ĉe la Universala Kongreso en Marseille ni akceptu rezolucion en kiun

ni instigos ĉiujn ŝtatojn de la mondo iom post iom, laŭ la cirkonstancoj kaj eblecoj, enkonduki Esperanton en lernejojn kiel devigan lernobjekton. Poste ni elektu REALIGAN KOMITATON kun sidejo en Parizo, kiu la rezolucion, kun eventualaj klarigoj, dissendos al ĉiuj registaroj de la mondo kaj restos kun ili en kontakto, ĝis minimume 15 ŝtatoj realigos la deziron esprimitan en la rezolucio. Fine ni decidu, ke U.E.A. morale kaj materie ebligu la laboron al la Realiga Komitato kaj per siaj Landaj Asocioj kaj individuaj membroj subtenu ĝin.

★

★

### PROJEKTO DE REZOLUCIO

La 42-a Universala Kongreso de Eeperanto okazanta en Marseille, Francujo, de la 27-a de Julio ĝis la 3-a de Aŭgusto 1957 okaze de la 70-jara datreveno de apero de la unua lernolibro de Esperanto, unuanime akceptas jenan

### REZOLUCION :

KONSIDERANTE, KE UNESKO, en sia rezolucio, akceptita dum Konferenco en la jaro 1954 en Montevideo, agnoskis Esperanton efika instrumento por disvolvo de kulturaj kaj sciencaj rilatoj inter la nacioj,

KE la lernantoj, lernintaj Esperanton, pli facile kaj pli bone lernas sian gepatran lingvon, kiel montris eksperimentoj ;

KE ili ankaŭ pli facile studas fremdajn lingvojn laŭ sukcesoj atingitaj en faritaj eksperimentoj ;

KE ili povas korespondadi kun siaj gekamaradoj de aliaj nacioj, amikiĝi kun ili, interŝanĝi ideojn kaj dokumentojn por pli facile kompreni aliajn lernobjektojn ;

KE estas bezone la junularon eduki ai

(fino sekvapaĝe)

# Esperanto je la servo de neesperanta revuo

Pedagogia revuo por instruistoj de duagradaĵaj lernejoj kaj universitataj profesoroj entreprenis esploron pri la temo: *Edukado kaj instruado en la Mondo*. Mi proponis kolekti respondojn pere de la internacia lingvo. La redaktisto akceptis.

Mi dissendis leterojn kaj cirkulerojn. (Vidu ankaŭ en I.P.R. 1956, p. 2 kaj 26). Respondo de esperantistoj venis el Germanujo 1, Anglujo 2, Jugoslavio 1, Finnlando 2, al kiuj mi aldonis peceton el esperanta revuo. Mi tradukis al la franca, kaj verkis prezentan enkondukon. Poste mi tajpis la tuton (19 p. 1/2) kaj sendis al la revuo.

La redaktoro dankis, asertis ke li eldonos parton de la kontribuajo kaj petis helpon por dua esploro: *Instruado de franca lingvo al fremduloj*. Mi faris certe tre grandan laboron. Ĉu tre utila? Respondo dependas de la grado de postulo. Mia celo estis modesta: mi volis montri konkretan pruvon pri la praktika valoro de Esperanto sur kampo internacia kaj mi volis ĝin montri al la medio instruista kaj universitata, kie abundas rilate al Esperanto antaŭjuĝoj, nescio, dubemo, kaj eĉ blinda kontraŭemo. La celo estas plene trafita.

La pritraktita revuo « *Cahiers Pédagogiques* » en sia numero de 15-a de Septembro 1956, kiu rilatas al la instruado en Britujo kaj Nederlando entenas sub titolo « BUTLER-leĝo » parton de la kontribuajo de angla esperantisto. La enkonduko a) kaj finvortoj b) mem verkitaj de la redaktisto tekstas jene. a) Pri tiu leĝo ni pruntas kelkajn priskribojn de S-ro Arthur John Hicks, profesoro pri historio. Tiu artikolo estas tradukita el Esperanto de F-ino DEDIEU, profesorino en Toulouse. Ni debaŭras ĝin tranĉi ĉar ĝi tre klare karakterizas kelkajn el la sistemoj loke adaptitaj en la kadro de la BUTLER-leĝo.

b) Dank' al Esperanto F-ino DEDIEU kolektis por la « C. P. » abundetan materialon, kiun ni uzos laŭ irado de nia priskribo koncerne al instruado en eksferlando. F-ino DEDIEU atentigis nin, ke tiu materialo devenas el pluraj landoj, kies lingvon ŝi ne lernis, kaj pro tio ŝi ne povus ĝin kolekti sen la perilo Esperanto. Al S-ro Hicks ni sendis gratulojn pri la klareco de lia priskribo; li respondis, ke tiun kvaliton li verŝajne ŝuldas al sia Esperanto-lernado.

Trifoje la vorto Esperanto aperas en tiuj notoj; menciata estas la praktika valoro de la internacia lingvo kaj ates-

tata ĝia mensesduka forto. Legante la artikolon oni povas konvinkigi pri la taŭgeco de Esperanto kiel portilo de la ideoj kaj faktoj esprimitaj.

En numero de la 15-a de Novembro 1956 temas pri la *instruado en Germanujo* kaj entenas parton de peresperanta kontribuajo.

Titolo: « *Esperanto kiel testo al duagrada instruado* », verkita de S-ro Richard PFÜTZE, Schleswig-Holstein. El Esperanto tradukis F-ino DEDIEU. Enkonduko: Tiu artikolon havigis al ni F-ino DEDIEU, profesorino en Toulouse. Dank' al Esperanto ŝi povis ĝin kolekti kaj traduki.

Karaj legantoj de I.P.R., se la cirkonstancoj favoras similan provon, ne hezitu, faru! Vi certe utilos al Esperanto!

Decembro 1956. Jeanne DEDIEU.

P.S. — El la per Esperanto kolektita materialo aperis post verkado de ĉi-supra artikolo en la numero de la 5-a de Januaro jene « *Jugoslavio: La socia administrado de la lernejoj* », de F. NOVLIAN (Zagreb).

« *Finnlando: La ekzamenoj* », de Niilo KALLIO, D-ro pri filozofio kaj direktoro de la tutlanda instruado. (Ni legas: N.d.I.R.: Speciale verkita por « C.P. ». El la finna esperantigis Vilho SETALA (Helsinki) delegito de Universala Esperanto-Asocio. El Esperanto al la franca tradukis F-ino DEDIEU).

2) *La nova lernejo en Lohja*, Vilho SETALA.

## JUBILEA TASKO (fino)

komprene, toleremo kaj estimo de aliaj nacioj kaj iliaj kulturoj, kion ebligas Esperanto;

KE oni ĉiam pli kaj pli sentas la bezonon de unu komuna, neŭtrala kaj facile ellernebla lingvo en la internaciaj trafiko, komerco, turismo, radio, flimo, sporto kaj scienco, por kunlaboro sur bazo de egalrajteco sur ĉiuj kampoj de homaj aktivecoj;

La Kongreso konstatas, ke estas nepre dezirinde iom post iom, laŭ la cirkonstancoj kaj eblecoj, enkonduki Esperanton kiel devigan lernobjekton en la ĝeneraledukajn lernejojn de la tuta mondo, plej bone en la klasojn inter la elementaj, en kiuj estas uzata nur la nacia lingvo, kaj la superaj klasoj, en kiuj estas instruata iu fremda lingvo.

Por realigo de ĉi tiu rezolucio la Kongreso elektas Konstantan Realigan Komitaton kun sidejo en Parizo.

Rudolf Rakuša

## INTERNACIA LEGOLIBRO

*Ĉu la tempo maturiĝis por grava tutmonda ago?*

La instruado de Esperanto atingas post la daŭriga kurso punkton, kiam pli altaj kaj vastaj intelektaj kaj kulturaj demandoj komencas interesi la 15-17-jaran lernanton. Kvankam la lingvo mem estas ankoraŭ ĉiam la kerno de lia intereso, tamen la spirito volas disbati la barilon de la limigita horizonto, la mensa evoluo kune kun la spirito de Esperanto serĉas problemojn, kiuj koncernas la rilatojn de homo al homo, al familio, socio, ŝtato, homaro kaj universala kulturo. La deziro por novaj ekzonoj, la intereso pri tutmonda historio, politiko, arto kaj scienco, ĉio ĉi kune kun la emo eluzi por tiuj celoj Esperanton, gvidas la lernanton al la societa vivo, al la legado de esperantaj libroj kaj gazetoj, al la korespondado kun eksterlandanoj. Esperanto fariĝas rimedo kiel ĉiu alia lingvo, tamen kun internacia spirito.

Por la instruado de la supera kurso tia evoluo de la lernanto estas natura fenomeno kaj lia devo estas per ĉiuj fortoj ĝin subteni. Sed baldaŭ li rimarkas, ke mankas dum la instruado iu centra instruilo, ĉirkaŭ kiu devus grupiĝi la malsamaj interesoj de diversaj progresemaj lernantoj. Ekstas danĝero, ke la instruado dissplitiĝas. La ilo devas pozitive kontribui al la celoj de nuntempa edukado, helpi ĉe la formado de unueca personeco kaj ideale kompletigi la eventualan fakan edukadon. Tiujn postulojn povas plenumi speciale redaktita gazeto, sed plej facile legolibro, kunmetita laŭ tute novaj vidpunktoj.

Decidiga estas la konstato, ke la bezono de tia legolibro por superaj kursoj estas jam aktuala. Plimultiĝas lernantoj, kiuj post la daŭriga kurso ŝatas plilongigi la studadon sub celkonscia gvidado. En Jugoslavio, precipe en Slovenio, estas la demando kion fari en la superaj kursoj, jam urĝa. Slovenia Esperanto-Ligo estas preta eldoni konvenan legolibron (pere de Stata eldonejo, kiu jam propra-koste eldonis lernolibrojn por la elementa kaj daŭriga kursoj), sed la kunmetado de internacia legolibro signifas laboron, kiu superas la kompetentecon de unu nacio aŭ ŝtato.

Ni esperantistoj bone scias, ke Esperanto estas valora rimedo por sukcesa edukado al internacia pensmaniero. Bedaŭrinde la plej multaj neesperantistaj intelektuloj vidas en ni ankoraŭ ĉiam iun sekton, iun nombre malfortan movadon, kiu en la praktiko ne havas la signifon, disaŭdigitan de ĝi mem. Nur konkretaj agoj kaj ciferoj konvinkas la mondon. La internacia legolibro povas fariĝi fakto, kiu reeĥos en la internaciaj kulturaj aŭ almenaŭ pedagogiaj sferoj.

La ago ne estos io granda, tamen ĝi estos io tute nova.

Unue ni konsciiĝu, ke la internacian legolibron ne bezonas nur ni esperantistoj por la supera kurso. Bezonas ĝin por la maturiĝintaj geknaboj la nuntempa eduksistemo ĝenerale. En ĉiuj ŝtatoj, aliĝintaj al UNO, predikas la kompetentuloj, ke la nova generacio estu edukita en la senco de la UNO-principaro: plej famaj verkistoj kaj sciencistoj laŭte proklamis kaj proklamas, ke la tutmonda evoluo postulas ĉie gvidi la junularon tra la nacia kulturo al la universala; la politikaj gvidantoj en okcidento kaj oriento kondamnas la faŝismon kaj gloras la pacan internacian kunvivon — en malsamaj nuancoj.

En tia atmosfero estus malsaĝe, se ni esperantistoj mem kunmetus la internacian legolibron. Ni laŭtigu nur nian voĉon, ke ni urĝe bezonas la enhavon, kiun kunmetu la plej bonaj kapoj de la nuna mondo. La enhavo estu la spegulo de tio, kio ligas la homaron kaj gvidas ĝin al pli bela estonteco, ĝi estu legebla kaj studinda ĉie en la mondo, ĝi peru al la junularo la komprenon de ideoj, kiuj estas eternaj kaj senlimaj.

Se iu internacia institucio estos farinta la laboron, ni esperantistoj estos la unuaj, kiuj tradukos, eldonos kaj uzos ĝin. Car pri tio ne ekzistas dubo, ni havas ankoraŭ la rajton, oficiale doni la iniciaton pri la efektiviĝo de la ideo. Ĉiam ni povas pruvi, ke la legolibro estas por la Esperanto-movado afero tre aktuala.

Por nun estas gravaj du demandoj.

1. — *Demando al instruantoj de Esperanto*: Ĉu vi samopinias pri la bezono kaj utilo de internacia legolibro por la supera kurso de Esperanto? Ne diskutu pri la enhavo, tion ni lasu al aliaj instancoj.

2. — *Demando al la estraro de UEA, al ILEI kaj GEE*: Ĉu la ideo supre skizita valoras, ke niaj superaj organizaĵoj okupu sin pri la afero kaj donu la iniciaton al iu internacia institucio. Se ĝi valoras, ĉu la menciitaj organizaĵoj opinias, ke nuntempe ekzistas eblecoj por efektiviĝi la ideon sur alta internacia nivelo?

Facile estas trovi « bonan » ideon, pli malfacile estas ĝin realigi. La kerno de la ideo estas meti inter la tutmonda intelektularo (eble UNESKO) konkretan proponon, kiu ne koncernas rekte Esperanton, sed estas afero de la internacia edukado. Esperanto povas ĉe tio morale, propagande kaj enhave nur profiti. Iu ajn malsukceso ŝarĝus aliajn sferojn.

*Interesitoj rekte rilatu kun la aŭtoro*: Rudolf RAKUŠA, Vrbanska 5, Maribor, Jugoslavio. La redakcio forte konsilas la interesitojn respondi al S-ano Rakuša, kiu plu verkos pri la temo.

## Rapporto pri la instruado de la franca lingvo al alilandanoj per esperanto

*Certe la peresperanta studo de naciaj lingvoj estos preparolita en la Marsejla Universala Kongreso. Pro tio ni opinias interesa traduke aperigi la ĉi-suban raporton pri studo de la franca lingvo. Similaj eksperimentoj devus esti farataj aliloke, profite al aliaj lingvoj. Plia paŝo estus ekzemple pli zorga atento en la pretigo de vortaroj naciaj-esperantaj : ili povu plene kaj sufiĉe utili al lernantoj de la koncernaj naciaj lingvoj ; ili donu la samajn elementojn, kiel la vortaroj naciaj-alinaciaj (prononco, neregulaĵoj, ktp...). Ĉiu kulturlingvo posedas taŭgajn rimedojn ankaŭ por lerni aliajn lingvojn. — Red.*

Eksperimento de tre granda intereso estis realigita en la Esperantista Kulturdomo (Kastelo de Grésillon, Baugé, M. et-L) dum la du lastaj semajnoj de Julio 1956.

Dum tiu tempo, restadis, kune kun tri-deko da francaj samideanoj, tri germanoj, unu italo, unu suomo kaj unu anglo, kiuj deziris perfektigi en la studado de la franca.

La mateno estis dediĉata al la studado de la franca gramatiko, la posttagmezo al la studado de la vortrezoro kaj al la konversado.

Ĉio estis klarigata en Esperanto. La profesoroj estis aparte komfortaj rilate al siaj lernantoj, ĝuste pro tio, ke ili povis libere klarigi ĉion pridemanditan.

Esperanto montris en la instruado de la franca la jenajn avantaĝojn :

— *unu*e, eblas kunigi lernantojn el tre malsamaj naciecoj, tial ke la profesoro tute ne bezonas scipovi la naciajn lingvojn de la lernantoj ; Esperanto utilas nur kiel komprenilo, ne intermiksiĝante kun la nacia karaktero de la instruata lingvo ;

— *due*, rekta instruado de la franca, same kiel per la rekta metodo, sed kun multe pli granda efikeco, kun la eblo de ellernado multe pli rapida ; dum la praktikaj ekzercoj de konversado la lernanto ekkutimigas pensi en la franca, ĉar oni neniam tradukas en lian lingvon ; ĉar Esperanto ne posedas idiomismojn, la francismoj devas esti klarigataj per siaj logikaj ekvivalentoj kaj la lernantoj tiam kapablas readapti ilin en siaj lingvoj.

— *trie*, eblas doni gramatikan instruadon sisteman kaj rapidan (nepre necesan, ĉar la rekta metodo ja estas nesufiĉa) ; ĉiunomente eblas al la profesoro interparoli kun siaj lernantoj, neniam sentante lingvan malsuperecon ; kaj tio pli gravas ol oni opinias.

— *fine*, ĉar Esperanto posedas ĉirkaŭ 75 % da latinidaj radikoj, la nelatinidaj alililandanoj konas la esencan parton de la franca vortrezoro, se ili alvenas al tiu lingvo per Esperanto ; tio estis la kazo, precipe, de la suoma partoprenantino.

La alilandanoj, juliaj gastoj de Grésillon, agnoskis, fine de la staĝo (\*), ke ili ege progresis en la kono de la franca.

Cetere necesas agnoski la tre grandan bonvolon de la lernantoj, ilian diligentecon kaj precipe la intereson, kiun ili trovis en la studo de la franca. « La esperantista atmosfero » certe iel kaŭzas en ĉio ĉi. Ni nepre akcentu tiun etoson, kiu ne fremdas al la sukceso de nia entrepreno.

Kun atento al la ĉi-jara eksperimento, eblos pretigi la venontjarajn kursojn kaj ankaŭ antaŭvidi kursojn el diversaj gradoj : inica, perfektiga, literaturstuda.

Necesas rimarki ke la nombro de staĝanoj certe estus pli granda se estintus ebla precize indiki la programon. Tion ni ne povis fari, ĉar ni mem ne tro konis la celon...

Kontraŭe al ebla opinio, la studo de Esperanto ne malutilas al la disvastigo de la francaj lingvoj kaj kulturo. Ĝi faciligas la internaciajn interŝanĝojn, ebligante la rektajn kontaktojn. Sed multaj alilandanoj venintaj dank'al Esperanto, poste ekdeziras pli bone koni nian kulturon kaj nian lingvon ; Esperanto ebligas kontentigi tiun deziron kun malta facileco ; ĝuste pro tiu deziro estis ĉi-jare aranĝita la staĝo en Grésillon.

Nia eksperimento montris la valoron de Esperanto por la disvastigo de la franca alilande. Ni deziras havi eblon daŭrigi en la sekva jaro kun pli ampleksa staĝo. Ni estus feliĉaj se la oficialaj instancoj apogus kaj kuraĝigus nin.

J. BÉNISTANT,

Departementa Inspektoro de la Unuagrada Instruado en Le Mans. Kursgvidinto.

(Trad. A. A.)

GLOSO : *staĝo* : difinita prepartempo (alifoje : provtempo) por specialaj celoj. *Ekz.* : En 1957 staĝo por studi la francan lingvon okazos dum tri semajnoj (25 Jul. 10 Aŭg.) sub la patronado de la franca Ministro pri Nacia Edukado. — Vorto ekuzita de la Grésillonaj staĝanoj — F. *stage* (el L. *stagium*).

Marjorie Boulton

## Kelkaj provizoraj pensoj pri plezuro

En Britujo oni nun, post jardekoj, finfine komencas venki la maltaktikan sintenon de multaj aŭtoritatoj, la sintenon kiu postulis ke geinstruistoj estu kiel eble plej malŝikaj kaj mallogaj fizike. Iam, instruistinoj ofte ne kuragis uzi kosmetikojn, juvelojn aŭ ungalakon, kaj la tradicia bildo de instruisto, en la kolektiva menso, estis de grizharulo kun sulkoreto sur la vizaĝo kaj kretopolvo sur la kompleto. Oni celis, eble, ke geinstruistoj estu noble dediĉitaj personoj; la tro ofta rezulto estis, ke per natura pensasocio ordinaraj homoj ekkredis, ke intelektaj plezuroj kaj interesoj apartenas nur al geeŭnukoj. Malamo al «intelektuloj» ankoraŭ tre fortas en pluraj landoj; la kaŭzoj estas sendube komplikaj; sed tiu longa tradicio ke geinstruistoj estu mallogaj ne helpas krei respekton al klereco kaj klerigado.

Geinstruistoj en Britujo nun rajtas vivi iom pli normale, kvankam mankas al ili ankoraŭ diversaj demokratiaj rajtoj pri verk- kaj pens-libereco kaj pri la eksterprofesia vivo. Sed ĉu ni mem emas montri strangan mankon en nia sinteno al niaj gelernantoj? Ĉu ni mem ankoraŭ sentas inklinon malŝati plezuron por aliaj?

Oni povus troigi. En la ĵurnaloj oni legas pri ekسدzigaj procesoj, sed la teatra lumo de ĵurnala publikigo ne kutime atentigas nin pri feliĉaj geedzaj paroj; oni legas multon pri la krimoj, suferoj kaj stultajtoj de la homaro kaj facile forgesas ke se tiuj aferoj ne estus iasence esceptaĵoj, ili ne estus taŭgaj ĵurnalaj novaĵoj. Tamen, almenaŭ en mia lando oni konsternite ofte legas pri geinstruistoj kies morala sinteno estas, ŝajne, aŭ la amara tradicia proverbo: « Iru enketi pri tio, kion la bebo faras, kaj diru al li ke li ne rajtas fari tion ».

Oni malpermesis al kelkaj 14-jaraj knabinoj iri al siaj plej ŝatataj lecionoj, ĉar ili portis orelingojn. La aferoj iĝis loka diplomacia krizo. Dum mi skribas, oni kolere disputas pri iu lernejestro, kiu malpermesas al siaj gelernantoj, ekster la lecionhoroj, danci ĝazide (« rock 'n' roll »). Iam oni malpermesis al junulino porti sian fianĉinan ringon en la lernejo, kvankam ŝi jam atingis la laŭlegan edziniĝrajtan agon. Alia lernejestro malpermesis al siaj lernantoj manĝi frititajn terpomojn surstrate kiel aliaj britoj ofte manĝas ilin — eble estetike bedaŭrinde, sed ĉu malmorale? Multegaj geinstruistoj provas malpermesi al gejunuloj eĉ preter la geedzigrajta aĝo aŭdumdi per eĉ la plej malgravaj karesoj.

(La bonkoruloj inter ili sendube timas verajn malfeliĉigajn erarojn. Tamen, laŭ miaj observoj, la kaldronegoj sen savoklapoj plej ofte eksplodas). Mi mem iam intervjuigis pri posteno en gimnazio kie oficiala regulo estis: « Neniu ajn knabino uzos fontoplumon » — mi fakte trovis tre malagrablan etoson en la tufa lernejo, kaj ĝojis ĉar oni ne proponis al mi la postenon. Mi konis infanternejojn, eĉ kiu instruistino malpermesis al la knabetoj « ludi indianojn » en la ludkorto, kaj malpermesis ankaŭ ke oni ludu en la sunlumo. Ĉu eble ni iom emas al iu malpermesmanio?

Homoj kiuj iel regas tre junajn homojn devas iam malpermesi ion: por gardi bonordon, sen kiu socio ne funkcias; por ke unu ne malbonfaru al alia; por ke iu personeto ne difektu sin mem. Sed ĉu eble potenco koruptas nin, same kiel ĝi koruptas politikistojn, ĝis ni sentas malsanan apetiton al potenco kaj prestiĝo kaj komencas krei regulojn, malprobi, malpermesi nur por sentigi nian propran gravecon? Aŭ ĉu eble tiu malpermesmanio kreskas ĉar, sentante niajn ja gravajn respondecojn, ni tro timas pri la sorto de junaj homoj en libero?

Oni povus pripensi aliajn kaŭzojn: tiun tragikan klasbatalon de la generacioj, kiu fontas el envio; nervostreĉojn, pro junaj bruoj kaj petolaĵoj, kiuj povas finfine kaŭzi kvazaŭ malamon en eĉ bonkoraj homoj; kaj tiun mistere profunde enradikitan homan supersticon, kiu iam kredigas al ni ĉiuj ke tio, kio estas agrabla, estas malbona. Mi ne volas nun fari pli ol iom pensigi pri kriterioj.

Konkludoj estas ĉiam same trosimpligitaj kiel pensigaj demandoj estas valoraj; sed se mi devus starigi provizorajn kriteriojn pri tiu ĉi afero, mi dirus: Ni konstata, ke gusto ne estas moralo; ke estas bone, ke gejunuloj kiel eble plej ĝuu la vivon kaj dum la libera tempo ĝuu siajn preferatajn plezurojn, nur kondiĉe ke ili ne malbonfaru al aliaj aŭ grave difektu sin mem; ke la kromokupoj kiuj ŝajnas al ni perdo de valora tempo eble edukas pli ol ni scias; ke eble post dudek jaroj niaj nunaj kromokupoj ŝajnos al ni mem stultaj; kaj ke ni ĉiuj rajtas, jes, eĉ rajtas, fari kelkajn erarojn, por ke ni pli profunde eniru kaj komprenu la vivon.

Dume, la gejunuloj dancu, eĉ ĝazide; ĉar mi ankoraŭ ne estas blankharara, kaj mi jam havas apenaŭ la forton tiel danci. La homoj preskaŭ ĉiam havas abundajn okazojn por plori.

Atanas D. Atanasov — Ada.

# LERNU KAJ INSTRUU



Sesa leciono

## NIA INSTRUISTO

Nun mi prezentos al vi per kelkaj vortoj ankaŭ tiun, kiu instruas al ni esperanton.

Lia nomo estas Konstantino Ivanov. Homo 30-jara, mezalta (nek tre alta, nek maltalta), nedika, vizaĝo ovala, nazo iom kurba, okuloj brunaj, haroj same brunaj, malgrandaj lipharoj...

Vi certe diros al mi : Kio estas do tio ? Ĉu vi verkas ian priskribon por la legitimilo de via instruisto ?

Ho, tute ne. Mi simple deziras doni lian fizikan portreton. Mi legis ie, ke tiel oni iam komencis karakterizi personon.

Do, aŭskultu plu. Nia instruisto havas flaman rigardon, energian parolon.

En siaj rilatoj al ni li estas tre delikata. Iufoje li permesas al si diri ian ŝercon, sed neniam li mokas kiun ajn. Ni sentas en lia persono homon bonan, honestan, kulturen kaj tre inteligentan. Profesie li estas gimnazia instruisto de historio. Mi diras : vera instruisto. Kun kia granda pacienco li okupas sin kun iu el la malpli kleraj kursanoj, por klarigi al ili iun regulon ! Kun iom da ŝercoj, iom da seriozaj ekzemploj li ĉiam sukcesas klarigi plene ĉiun regulon.

Ordinare en la komenco de la leciono li trarigardas la kajerojn de la kursanoj. Ni rimarkas, ke li ne estas kontenta, se ies kajero ne estas en ordo. Tiu, kies kajero estas tia, hontas.

Nia instruisto perfekte posedas esperanton kaj instruas ĝin kun granda amo. Per tio li influas ankaŭ al ni lerni la lingvon kun amo.

La kurson li gvidas tre lerte kaj la rezultoj de lia laboro estas pli ol kontentigaj. Ili estas bonegaj !

Li konstante sugestias al ni, ke niaj konoj jam estas sufiĉaj por esprimi ordinarajn pensojn pri aferoj el la ĉiutaga vivo ; oni nur devas venki la timon paroli en fremda lingvo. Li rekomendas al ni komenci korespondi kun alilandaj samideanoj.

*Proverbo.* — « Io » estas pli bona ol « nenio ».

### KORELATIVAJ VORTOJ.

iu io ia ie iam iom iel ial.

Ĉe tiuj vortetoj mankas la komencaj sonoj *k, t, ĉ, nen*. Per ili ni nek demandas, nek montras, nek ĝeneraligas, nek neas. Ili estas nedifinitaj pronomoj, adjektivoj kaj adverboj.

Kies = de kiu. Ties. Ĉies. Nienes.

Kies libro estas tiu ĉi ? = De kiu estas tiu ĉi libro ?

Al kiu apartenas tiu ĉi libro ?

Ĉies libro povas servi al ni, ne nur la via. Ĉies opinio estas valora.

Nienes libro estas pura.

Donu al mi ies libron ; ne gravas, kies ĝi estas.

*Sistemo de la korelativaj vortoj :*

Bazo nedifinita *I*

Komencaj sonoj :

por demandi	K	k - i
por montri	T	t - i
por ĝenerali	Ĉ	ĉ - i
por nei	NEN	nen - i

Finajtoj :

persono, individua objekto	U : i - u, k - i - u ktp.
objekto, okazo	O : i - o, k - i - o
kvalito	A : i - a, k - i - a



loko	E : i - e, k - i - e
tempo	AM : i - am, k - i - am
kvanto	OM : i - om, k - i - om
maniero	EL : i - el, k - i - el
kaŭzo	AL : i - al, k - i - al
posedo	ES : i - es, k - i - es

Por demandi pri persono ni formos vorton tiel : K - I - U = kiu.

Por montri lokon : T - I - E = tie.

De la korelativaj vortoj ni povas formi ankaŭ diversajn gramatikajn kategoriojn (substantivojn, adjektivojn k.c.) : kiea (de kiu loko), tiea (tiuloka, de tiu loko), ĉi-tiea, iama (kiutempa, de kiu tempo), la tiamaj esperantistoj (la esperantistoj de tiu tempo, de tiu epoko), ĉiama, kioma (kioma horo estas?), iome, iomete, kialo (kaŭzo : kiu estas la kialo de tiu evento?).

Atentindaj kombinoj : kelkiu, kelkiam.

NOTO. — Por rekapitulacii la materion pri la korelativaj vortoj, la instruanto povas doni ilin ankaŭ tabele. Kröme estas ankaŭ ilustraĵo, kiu ilin prezentas bilde.

IOM = ia kvanto (nedifinita kvanto) : ĝia signifo estas *nemulta kvanto* : iom da mono, iom da pano, post iom da tempo, ankoraŭ iom da pacienco.

Kioma : kioma estas la horo? Ioma : post ioma tempo (post iom da tempo, post nelonga tempo). Iomete = malmulte : iomete da pano; ankoraŭ iomete.

AJN : kiu ajn = iu, ne gravas kiu precize, ĉiu egale. Kio ajn : Diru ion. — Kion? — Nu, kion ajn, nur parolu kelkajn vortojn. Kie ajn : Kie ajn vi estos, mi trovos vin. Kiam ajn : Kiam ajn vi venos (en ĉiu tempo, kiam vi venos), vi trovos iun el ni.

#### NOTINDAJ VORTUZOJ.

NEK estas uzata kiam estas *pli ol unu* neo : nek mi, nek vi ; nek en nia domo, nek en la via ; vi nek legas, nek skribas ; mi ne vidis ŝin, nek ŝian fratinojn. Por unuopa neo estas uzata nur *ne*, ofte en akompano de *eĉ* (por pli forta neo) ; Mi eĉ ne scias tion. Eĉ unu homo ne venis. Ne pasis eĉ unu horo kaj li alportis la libron.

Lipharo — haro(j) kiu estas (kreskas) sur lipo.

Priskribi — skribi pro io, rakonti sisteme pri io. Mi priskribas nian urbon. Priskribu la ekskurson! Priskribo de la urbo. Priskribo de la ekskurso.

Legitimilo — karto, dokumento, per kiu persono povas legitimi sin, aserti, pruvi kiu li estas.

Iam — iufoje. *Iam* ofte estas uzata por esprimi nedefinitan tempon en la pasinteco ; tiel, ordinarne, oni komencas infanajn fabelojn : *Iam* vivis reĝo kaj reĝino. En sia vasta senco : *iam* = iufoje — en iu momento.

Mi permesas al mi — vi permesas al vi — li permesas al si (faru diferencon inter : « li permesas al si » = al si mem, kaj « li permesas al li » — al iu alia persono). Mi permesas al mi peti de vi servon. Mi permesas al mi prezenti al vi mian amikon. Permesu al mi prezenti al vi mian amikon. Mi prezentas al mi kiom li ĝojos pro tio.

#### EKZERCŬJ.

1. KIES domo estas alta? ... estas alta.  
 kostumo nigra? .....  
 okuloj bluaj? .....  
 nomo bela? .....

2. I... Venas al ni.

I... mi loĝis en Parizo.

Mi ne trovas I... interesan en la rakonto.

Se vi vidus I... mian fratinojn, diru al li, ke mi atendas lin.

Se vi trovos I... eraron en mia letero, montru ĝin al mi.

3. Uzu *nek* aŭ *eĉ ne* (kie konvenas) en la sekvantaj propozicioj :

Li havas nek monon ... panon.

Li ... havas panon por manĝi.

Morgaŭ ŝi ne povos veni, ... ŝia fratino.

Mi... manĝos, ... trinkos.

Li ... intencas pagi.

# Pri moderna tekniko en lernejo

*Fakestro pri eduka kaj instrua kinematografio en Pedagogia Instituto de Leningrado Sovetio, enketis per Esperanto pri uzado de kinoprojekciiloj kaj modernaj teknikiloj en lernejoj.* Vidu E. et C., 1955, p. 156).

*Jen koncerne Francujon la respondo sendita de la franca asocio de esperantistaj edukistoj (G.E.E.), kiu tiucele petis informojn de oficialaj instancoj, indikante ke ĝi celas transsendi ilin al la menciita instituto. Tio estis okazo fari servon al la petinto, kaj altiri, koncerne la vivantan funkcion de Esperanto, la atenton de oficialuloj jen indiferentaj, jen skeptikaj, jen eĉ malfavoraj.* — J. D.

## RESPONDO A LA DEMANDARO DE

### LENINGRADA PEDAGOGIA INSTITUTO

*Antaŭparolo.* — Ne estas ankoraŭ laŭsistema detala etato pri la celita temo; ĝia starigo estas pristudata. La ĉi-subaj ciferoj estas proksimumaj. De post du jaroj grave kreskas la nombro de ĉiaj aparatoj « aŭdo-vidaj ».

I. — *Nombro da kino-projekciiloj* (sonaj aŭ senonaj) uzataj en lernejoj.

Ne ĉiu lernejo havas senonan aparaton. Multaj havas sonan.

Ĉirkaŭ 8.000 aparatoj (por 70.000 lernejoj) estas nuutempe uzataj en ŝtataj lernejoj. Plej multaj el ili estas plur-uzaj kaj same taŭgas por sonaj kiel por senonaj filmoj.

II. — *Nombro da aparatoj por lumbildoj — da radiofonoj, elektrofonoj, magnetofonoj.*

Koncerne lumbildajn projekciilojn, la nombro estas ja pli alta : proksimume 50.000 diaskopoj.

Radiofonoj : 10.000.

Elektrofonoj : 20.000.

Magnetofonoj : Nombro ankoraŭ nekonata.

Lernejaj televidaj riceviloj : 600.

III. — *Nombro da filmtitoloj uzeblaj en la instruado.*

La katalogo de la Filмотеко de Publika Instruado (t. e. la ŝtata instruado) enhavas proksimume 400 titolojn. El tiuj 400 titoloj, 200 celas unuagradajn lernejojn ; 200 aliaj la duagradajn kaj superajn.

Proksimume 200 titoloj en la Filмотеко de Teknika Instruado temas pri teknologio.

IV. — *Nombro da senonaj kaj sonaj filmoj.*

a) Kelkaj el la distribuitaj filmoj estas senonaj, sed la nuna produktado konsistas plej multe el sonfilmoj ; la du-uza aparato ebligas al la instruisto ĉesigi la sonon kaj mem komenti la filmon.

b) Kia filmo plej taŭgas ; senona aŭ sona (muta aŭ parola).

Pedagogoj tiurilate tre diverse opinias. Iuj preferas senonajn, kun komentado de la instruisto mem, kiu al klas-nivelo adaptas sian diron ; aliaj pliŝatas parolan filmon, kiu laŭ ili pliĝuste respondas al la realo.

V. — *Institutoj kaj asocioj.*

a) La « Lerneja Kino », same por produktado kiel por distribuado, dependas de la Nacia Centro de Pedagogia Dokumentado, fako de la Ministrejo de Nacia Edukado.


b) Organismo de Supera Instruado, la Centro Aŭdo-vida de « Ecole Normale Supérieure » (Supera Seminario) gvidas la klopodojn pri ĉiunivela uzo de la aŭdo-vidaj teknikoj ; ĝi organizas por edukistajn kursojn kaj provtempojn (t.n. « staĝoj »). Interkonsente kun Nacia Centro de Pedagogia Dokumentado, ĝi sin dediĉas ankaŭ al eksperimenta produktado de diversaj aŭdo-vidaj teknikoj.

c) Pluraj specialigitaj institutoj celas evoluigi prisciencan kinon ; plej grava el ili estas Instituto de Priscienca Kinematografio (Institut de Cinématographie Scientifique) estrita de S-ro Jean Painlevé.

d) Koncerne ĉirkaŭ-kaj post-lernejan kinon, pluraj privataj asocioj ricevis de Ministro pri Nacia Edukado rajton disvastigi perfilman kulturon. Plej grava el ili estas kinofako de Franca Ligo de l'Instruado.

VI. — *Fakaj revuoj kaj libroj (la ĉefaj).* (En la respondo sendita al la leningrada instituto sekvas listo de revuoj kaj libroj, kiun ni ne opinias utila reprodukti ĉi tie. Eventuala intereso pruante ricevos ĝin, sendante respond-kuponon (p.m. en Francujo) al la Redaktejo).

TIU TEKSTO estis verkita laŭ oficialaj informoj speciale kolektitaj de la asocio « Groupe des Educateurs Espérantistes », cele al respondo al demandaro de « Leningrada Pedagogia Instituto ». (Marto 1956).



Unuope ricevitaj verkoj estas menciataj, duope — recenzataj. Ĉiu recenzanto liberas en siaj diroj, pri kiuj la Redaktejo ne respondecas.

LA INFANA RASO. — Poemo en 25 ĉapitroj de William AULD. Kovrilo de John Hartley. 5 ilustraĵoj de Pierre Lavallo. STAFETO, belliteratura eldonserio 7. J. Reguloj, eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1956. 104 paĝoj 16 × 22,5 cm. Prezo :

W. AULD estas konata al ni kiel kun-aŭtoro en « Kvaropo », tiu unua eldono de « Stafeto » ; ĝi sensacie imponis en 1953 kaj jam de longaj monatoj estas elĉerpita. Tie, AULD sin montris verva kaj talenta disĉiplo de KALOCSAY kaj la buda-peŝta skolo. Stafeto la torĉo pluiris...

Nun estas prezentita al ni poemegon en 25 epizodoj ; unu konsistas el kvin vortoj, aliaj estas kvarpaĝaj ; plej diversaj ritmoj kaj rimoprocedoj ; eksperimenta uzo de novaj tipografiaj aranĝoj. Jen por la supra aspekto. Kaj la kerno ?

Nu ! En tre persona maniero AULD prezentas sian nunan filozofion, sian nunan komprenon pri la homo kaj la homaro. Kiel multaj pensuloj, li volis respondi al la eterna demando : « Kion ni faras sur Tero ? »

Meze de l' senfina spaco iu planedo, Tero, estas kovrita de bakteria kolonio, la homaro. Kaj tiuj bakterioj — ni — havas ĉefan celon : pluforgi la senfinan ĉenon de nia raso ; « la celon ni plenumas ».

Sed por ĝin plenumi, ni devas vivi : konstante barakti kaj luktadi kontraŭ la naturo, kontraŭ la similuloj : « la celo nin konsumas ». La homo aperas kiel lupro por la homo. Ne ke ĝi estas tiom malbona, esence ; sed prefere ke ĝia cerbo estas tre eta, tre rudimenta. Ĝia raso estas ankoraŭ tre proksima al la besta regno : ĝi estas infana raso !

Sed... « Tamen flagras vigle la fajrero ». Eta lumo de inteligento lasas esperi grandiozan evoluon... post miloj da jaroj... Intertempe la senfina ĉeno estos senĉese forĝata : « la celon ni plenumas, la celo nin konsumas ».

Du facetoj en la spirito de la aŭtoro : pesimismo kaj optimismo. Pesismisma, li memorigas nin pri Zamenhof, kiu vidis en ni « nur senŝencan pecon da viando, kiu kreĝis, oni ne scias pro kio kaj oni ne scias por kio... ktp... ». Sed same kiel Zamenhof, li solvis en si la pro-

blemon kaj revenas al optimismo. Tamen dum evidente Zamenhof adoptas diisman solvon, Auld adoptas ateistan. Por li la motoro de ĉiu agado estu la perfektigo kaj digno de l' homo, la kreo de ĉiam pli vasta kulturo ; li tamen ne iluzias sin pri la potenco de niaj ebloj.

Tre persona la formo : nenia kunligo, kvazaŭ la aŭtoro jetus sur paperon siajn ideojn, aŭ pli ĝuste kvazaŭ li eldirus siajn pensojn al intima amiko. La amiko konas liajn pensovojojn kaj ne bezonas klarigojn nek enkondukojn.

Tio kelkfoje faras la poemon iom hermeta por la neinicita leganto. Ekzemple en la XVIII-a periodo, oni devas ĝisiri la lastan kvaronon por kompreni per eta aludo pri Varsovio, ke « Li » en la tuta peco signas Zamenhofon. Simile, kiom da legantoj komprenos la signifon, kaj do ĝuos la ĝustan etoson, rilate la prasilabojn sal, ber, jon, roŝ ? Kiom da legantoj legis pri la teorioj de Marr (vidu : Andreev, « Revolucio en la lingvoscienco » aŭ « Retoriko »). Mi opinias, ke klarigoj ne estus lukso...

Kompense kia intelekta ĝuo ! Cetere, la lingvo mem estas ĉiam klara kaj komprenebla krom en kelkaj lokoj ; precipe en la kvara epizodo, kie ĝi estas intence alivestita per potencaj ludvortoj : ĝeneralo hakiras gloron..., larmejo brava (Parmeo). Sed kompreno de la frazoj estas nur unuagrada kompreno : poste oni kaptu la esencan signifon.

Jen entute belega poemo, kiun iuj eble nomos aŭdaca : ĝi efektive atakas multon, kiu eble estas kara al via koro aŭ penso. Ĝin ne legu, kiuj volas resti fermitaj en sia eta kapelo. Ĝin mi ne konsilus ankaŭ al nesperta esperantisto : la tuta menso devas esti libera por kapti la ideojn.

Nia movado produktis kelkajn ĉefverkojn. Mi opinias, ke talentuloj devus traduki ilin en naciajn lingvojn. Al pli larĝa publiko manifestigus la esperanta genio. Oni volus legi la originalojn. Ne dum longaj jardekoj, ni bezonus traduki... Nu ! *La Infana Raso* devus esti inter la unuaj tradukendaj : certe ne ripoziga tasko kun tia riĉa lingvo, kiel estas la Auld'a Esperanto...

A. A.

# INFORMOJ

## Imitu

### EL LA GAZETOJ

« *Skolske Novine* » (Lerneja gazeto el Zagrebo) n° 4 de la 18 jan. publikigis artikolon pri studo de nia kunlaboranto prof. F. NOVLAN : « Reformo de la lernejoj en Jugoslavio », kiu aperis en franca pedagogia revuo « *Cahiers Pédagogiques* » n° 5 de la 5 Jan., originale skribita en Esperanto kaj francen tradukita de F-ino DEDIEU el Tuluzo (vidu en tiu numero p. 38).

En la n° 5 (25 Jan.) de S.N. estas raporto pri artikolo « Instruado de matematiko, fiziko kaj kemio en jugoslavijaj mezlernejoj », kiu aperis en « *Suomen Matemaatikan ja Fysikan Opettajien Lütto* » (Suoma matematika kaj fizika revuo, el Helsinki). Verkis ĝin prof. Erkki SOINI laŭ materialo ricevita en Esperanto.

La 6-a n° (1 Feb.) aperigis sub esperanta titolo « *Grajnoj en Vento* », unukolonan artikolon pri la unua volumo de la dua rondo de « *Grajnoj en Vento* », interlerneja kaj internacia gazeto, kiun kunmetis en Esperanto naŭ diversaj lernejoj.

La 9-a n° (27 Feb.) raportas sub esperanta titolo, pri « *Paŝo post paŝo* », memorlibro de Bjelovara E-Societo, kiu ankaŭ sciigas pri Esperanto en tieaj lernejoj kaj pri rondvojaĝo de la lernantoj esperantistoj kaj muzikistoj.

De « *Ilustrowany Kurier Polski* » ni ricevis 11 n-rojn kun E-artikoloj kaj artikoloj. La n° 23 (1957) entenas 2 kolonojn pri Esperanto kaj UNESKO kun portreto de Zamenhof kaj foto de soveta E-poŝtmarko:

### ESPERANTO, FILATELO KAJ INSTRUADO

En la slovena taggazeto « *Večer* » de 8 Marto 57, aperis en traduko de prof. Rudolf RAKUŠA el Maribor la artikolon de prof. Pierre BOVET el Neuchâtel (Svisl.) kiu aperis sub la ĉi-supra titolo en I.P.R. 1957, p. 2.

### LERNOLIBRO DE GENERALA LINGVISTIKO KAJ ESPERANTO

Dum la pasinta 1956 jaro la plej granda bulgara eldonejo « Narodna Prosve-ta » (Popola Klerigo) eldonis unuan kaj duan parton de « Uvod v Ezikoznanie-to » (Enkonduko en la Lingvistikon) tradukitajn el rusa lingvo. La unuan parton (de Univ. Prof. A. S. ĈIKOVA-Tbilisi) tradukis s-ano Sim. HESAPĈIEV, redaktoro en la sama eldonejo. La duan parton

(de Univ. Prof. L. A. BULAHOVSKIJ) redaktis s-ano HESAPĈIEV kaj kiel redaktoro skribas : « Generale oni devas utiligi la lernadon de la lingvoj por interkonatiĝo kaj proksimiĝo de la popoloj » (paĝo 181).

Sur paĝo 190, aldona noto 87 (rilatas al la teksto sur paĝo 82) tekstas en traduko jene : « ankaŭ en Esperanto la verbo « prunti (zaemam) havas ambaŭ signifojn. La prepozicio post la verbo ĝustigas la signifon : mi pruntis al la malgrandan sumon (sekvas bulgara traduko : zaeħ mu, dadoh mu na zaem malka suma) ; mi pruntis de li (zaeh ot nego vzeħ ot nego na zaem). Estas eble ankaŭ diri pli ĝuste : mi pruntedonis (dadoh na zaem) ; mi prunteprenis (vzeħ na zaem). La redaktoro. »

En alia lernolibro — lernolibro de bulgara lingvo por la X kaj la Xi klasoj — laŭ insisto de s-ano HESAPĈIEV — la aŭtoro, Univ. Profesoro ANDREJĈIN, enmetis noton pri Esperanto. Poste la redaktoro aldonis longan piednoton pri la kvalitoj de Esperanto. Tiu ĉi lernolibro estos presita dum la somero.

## Kunvenoj

### TRIA INTERNACIA KURSO PRI ESPERANTO KAJ GEONISMO

20-27 Julio 1957 en *Münchenwiller*. Tempolimo por enskriboj : 20 Jun. 57 Kursgvidanto : D-ro W. Perrenoud, Fbg Gare 13, *Neuchâtel*, Organizo : Svisa E-Societo kaj Svisa E-Instituto, Breitenrainstrasse 12, *Berne* de kiu estas ricevebla bela prospekto.

### 13-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO

La 13-a Kongreso de T.E.J.O. okazos en urbeto apuda de *Avignon* (27 Jul. - 5 Aŭg. 57). Akcepto en la stacidomo de *Avignon*. Riĉa programo de ekskursoj en la regiono. Ĉesto ĉe teatraj prezentadoj dum la Festivalo de la Nacia Popola Teatro en la fama « Kastelo de la Papoj » en *Avignon*. Kvar diversaj kotizoj (de 8.500 fr.-fr. ĝis 13.000 fr.-fr.) laŭ la loĝomaniero, inkludantaj ĉiujn elspezojn (manĝoj, transportoj, biletoj, ktp...). Anoncu vin antaŭ la 1-a de Junio 1957 al S-ro Roger MOTTO, Rond-Point de la Gare, *Avignon* (Vaucluse).

### MOSKVA FESTIVALO

Post nia alvoko por la VI-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj por Paco kaj Amikeco, ni ricevis multajn petojn el Francujo. Ni respondos al ĉiuj petintoj, tuj kiam ni havos sufiĉe detalajn indikojn. Ni precizigu kelkajn punktojn :

1. Ni klopodas akiri interkonsenton kun la Franca Prepara Komitato por sendo de esperantista delegitaro.

2. Necesas, ke la kandidatoj bone parolu Esperanton.

3. Vojaĝo kaj restado estos organizataj komune. Supozeble la tuta elspezo ne superos 25.000 fr. Ni estonte donos pliajn detalojn.

4. En sia lasta alvoko, la internacia Prepara Komitato precizigas ke « la Festivalo estas malfermata al ĉiuj junuloj, sendepende de iliaj konvinkoj kaj konceptoj, raso kaj nacieco ; ĉe la Festivalo regos neniu ajn politika, filozofia aŭ alia tendenco ; la Festivalo okazos en spirito de reciprokaj respekto kaj komprenemo, en spirito de amikeco de la junularo de ĉiuj landoj.

5. Vi povas sendi proponojn pri la Festivalo al la Prepara Komitato de VI-a Festivalo, Moskvo (USSR).

Esperantistoj estu multnombraj en Moskvo !

Notu la adreson de la franca respondeculo por la esperantista delegitaro :

Jean THOMAS, 4, rue Louis-Pasteur, Boulogne (Seine).

Memoru la daton : 28-an de Julio-11-an de Aŭgusto.

## “ Grajnoj en Vento ”

*La Tutmondaj Interlernejaj Rondoĵ* (fonditaj en 1956).

*La celo de « Grajnoj en Vento » (GEV) estas :*

a) *krei reton de infanaj rondoj sur la tuta terglobo.*

Rondo estas aro de 12 klasoj aŭ grupoj. Ĉiu rondo eldonas 3-foje jare komunan gazeton kun verkoj de la ĝelernantoj (rondoj de infanoj 6-15-jaraj, rondoj de 15-20-jaraj junuloj). *La verkoj estas :* — tekstoj pri reala vivo en la hejmo, lernejo, vilaĝo, urbo, lando ; pri kutimoj, ludoj, festoj, ĝojoj kaj malfeliĉoj ; — desegnaĵoj, bildoj, fotoj, prospektoj, sekigitaj floroj, ktp.

*La formato de la folioj estas ĉiam 21 x 29,7 centimetroj. Ĉiu kunlaboranta klaso (grupo) sendas al rondestro po 20 ekzempleroj por ĉiu eldono de la gazet.*

b) *pruvi la taŭgecon de Esperanto por interrilatoj de tutmondaj ĝelernantoj.*

c) *enkonduki Esperanton en la lernejojn.*

d) *labori per la infanoj por la internacia kunlaboro.*

Por pligrandigi la 5 jam funkciantajn rondojn, ni adresas nian alvokon al klasoj kaj grupoj de ĉiuj landoj, speciale de tiuj, kiuj malmulte estas reprezentataj en la rondoj :

Italujo, Hispanujo, Islando, Norvegujo, Finnlando, Usono, Kanado, Brazilo, Urugvajo, Aŭstralio, Nov-Zelando, Japanujo, Hindujo, Ĉinujo, Vietnamo.

Informojn sendas la Centra Oficejo en

Svislando. Oni aldonu internacian respondkuponon. Financa kontribuo por helpi al plua disvastiĝo de la rondoj estas bonvena. Oni sendu ĝin per internacia poŝtmandato al nia poŝtĉekonta adreso : « Grajnoj en Vento », Marcel Erbetta, IVa 9485, rue des Pins 66, Bienne, Suisse.

## Komunikoj

« MONDO »

La granda propagandjurnalo *Mondo* aperanta en 2 eldonoj flandra kaj franca baldaŭ aperigos sian 4-an numeron Abonu tra via landa Esperanto-Asocio (220 fr.fr.) aŭ rekte al Mondo, Bredabaan, 280 Bräschaat, Belgio (p.ĉpk. Bruselo 890-81 : 35 b.fr.).

RADIO

Aŭskultu *Ibra*, la liberan kristanan radion, kiu sendas el Tangerang, Afriko. Ĝi sendas en pluraj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto. Ĉiumonate la lastan mardon je h. 20.00 *mezeŭropa tempo* Ibra havas esperantoprogramon. En februaro la ondlongoj estas 19,9 m., 26,5 m. kaj 33,6 m. Bonvolu aŭskulti kaj sendu raporton al Ibra Radio, Stockholm 1, Svedujo.

VERONA GVIDFOLIO, 8-paĝa, ilustrita, eldonita de Verona Esperanto asocio ĉe S-ro Rag Americo L. Reni. Via Rovereto, 6 Verona. Samadrese ricevebla : poŝtkarto pri la 59-a Internacia foiro de Verona. En tiu foiro la Esperanta Asocio disponos pri stando kaj petas ekspozici-materialon.

AIR FRANCE

*la plej granda aerliniaro en la mondo*

Kvarpaĝa informilo, presita sur luksa papero en tri koloroj, kun bildoj, eldonita okaze de la 42-a *Universala Kongreso de Esperanto*, Marseille 3-10 Aŭgusto 1957.

Senpage ricevebla de : Air France, 9, avenue Général-Leclerc, Marseille (3<sup>e</sup>), Francujo.

## Anoncetoj

*Lernolibrojn diversajn interŝanĝas* kun ĉiuj landoj, en ĉiuj lingvoj la plej granda bulgara ŝtata eldonejo, kiu eldonas lernolibrojn por elementaj, mezaj kaj duonsuperaj lernejoj en bulgara kaj en turka lingvo. Dum la 42-a Universala kongreso en Marseille redaktoro Sim. HESAPĈIEV, delegito de UEA, volas persone kontaktigi kun kolegoj ĉiulandaj. Skribu kaj proponu al : *Ŝtata eldonejo « Narodna prosveta » str. V. Drumev, 37 Sofia, 5 Bulgarujo.*

★★

*Korespondantojn* por siaj gekursanoj (instruistoj kaj lernantoj) serĉas s-ano Hristo Manolov, Gimnazio Polski Trambes, Tirnovsko, Bulgario.

# Distra Paĝo

## KONKURSO N° 3

Gajnintoj : S-ro Couwenberg, S-ro Berthold Fischer, Ges-roj Lenel, S-ro Trepier, S-ino Villette gajnis 2 poentojn ; Gratulojn al ĉiuj.

## KONKURSO N° 4

Gajnintoj : S-ro Bourry, S-ro Couwenberg, D-ro Jaromir Jermar, Ges-roj Lanz, S-ro Le Coze, S-ino Le Goff, Ges-roj Lenel, S-ino Pallard, S-ino Reyneau, S-ro Rochery gajnis 2 poentojn.

F-ino Caubel gajnis 1 poenton.

Post tiu konkurso S-ro Bourry gajnis 345-frankan libron.

Korajn gratulojn al la gajnintoj.

## KONKURSO N° 5

Jen la solvo :

*Horizontale.* — 1. Kristnasko ; 2. Odro, Naic ; 3. Mit, KT, Lan ; 4. Eh, Pres, Le ; 5. Veante ; 6. Enviem ; 7. Am, Talp, NF ; 8. Nab, To, Don ; 9. Tial, Loto ; 10. Otneitnok (Kontinento).

*Vertikale.* — 1. Komencanto ; 2. Rdih, Mait ; 3. Irt, Ve, Ban ; 4. So, Pent, Le ; 5. Kravat ; 6. Tenilo ; 7. An, Step, LT ; 8. Sal, Em, Don ; 9. Kial, Noto ; 10. Ocnedifnok (Konfidenco).

Gajnintoj : F-ino Arnould, S-ro Bourry, S-ro Calvet, S-ro Couwenberg, S-ro Berthold Fischer, S-ro Génuit, S-ino Lavalée, S-ro Le Coze, S-ino Le Goff, F-ino Robin, S-ino Villette gajnis 2 poentojn. S-ro Chevalier, Ges-roj Lanz, S-ino Lemoine, Ges-roj Lenel, S-ro Rochery, S-ino Gudula Thénée, S-ro Trepier gajnis 1 poenton.

Post tiu konkurso, S-ro Le Coze gajnis 315-frankan libron.

Ni tutkore gratulas nian fidelan korespondanton, kaj ĉiujn gajnintojn.

## KONKURSO N° 7

*Horizontale :*

1. Artista laŭvola ornamado de la kanto per triloj.

2. Inverse : Malgranda malbonodora mambesto ; inverse : Malhelpi.

3. Speco de ŝnuro preparita por konduki fajron (r) ; artikolo ; inverse : preskaŭ snobo.

4. Fonetike : monujo ; Planto, kiu liveras amaran kaj kontraŭfebran ŝelon ; partecipa finaĵo (r).

5. Rita tablo.

6. Prahistoria epoko (r).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2					■	■				
3				■			■			
4			■					■		
5	■								■	
6	■									■
7			■						■	
8				■				■		
9					■	■				
10										

7. Inverse : dependiga konjunkcio ; inflamo de la orelo (r) ; riĉeco (r).

8. Poseda adjektivo ; inverse : duona parto de surfaco de sfero inter du paralelaj rondoj ; unuigo (r).

9. Tio, pri kio oni verkas. Levilo (r).

10. Estanta en ombro.

*Vertikale :*

1. Kapabla pro sufiĉaj konoj.

2. Inverse : ekstera membrano ; inverse : malkonfesis.

3. Inverse : ĉambreto ; sufikso ; inverse : kutima inklinio.

4. Fonetike : elektro unuo ; muzika signo ; konjunkcio.

5. Retorika figuro.

6. Diserigi tutaĵon (r).

7. Inverse : partecipa finaĵo (r) ; inverse : streko ; fonetike : ĉefa punkto.

8. Sovaga bovo ; partecipa finaĵo (r) ; lomo granda aro da domoj (r).

9. Amfibia vertebrulo ; inverse : Eksplozkestoj.

10. Akuŝoscienco.

Bonvolu sendi viajn solvojn ĝis la 25-a de la venonta monato al S-ro Guillot, Cours de la 4<sup>e</sup>-République, Gaillard (Hte-Savoie).

## Anoncetoj

La kvara klaso de la okjara lernejo (11-jaraj gelernantoj) deziras korespondi kun gelernantoj en aliaj landoj. Skribu al : 4. razred osmogodiŝnja škola, Novi-grad Podravski, Jugoslavio.

# PERANTOJ DE I. P. R.

BRITA : « *The British Esperanto Association* », 140, Holland Park Avenue, London, W 11.

Jarabono : 8 ŝilingoj.

BULGARA : *Bulgara Esperantista Asocio, Sofia*, Bul. Stalin n° 40.

Jarabono : 8 levoj.

DANA : « *Dansk Esperanto-Forlag* », Ingemannsvej 9, *Aabyhof*. (Cek-konto :16.295).

Jarabono : 8 kronoj.

GERMANA : Helmut ROSSLER, 22 b, *Hechtsheim bei Mainz*, Friedensstr. 15. Cek-konto : 43 357 Ludwigshafen/Rhein.

Jarabono : 4,8 germanaj markoj.

HISPANA : E. CALVET, Pl. Gral Sanjurjo, 7, *Tarragona*. (Konto n° 956-293 ĉe « Banco Espanol de Credito »).

Jarabono : 44 pesetoj.

ITALA : Eduardo ZUMBO, Via del Carmine, 4, *Torino*.

Jarabono : 700 liroj.

JUGOSLAVA : Josip VAJDLIH, Podolje 15, *Zagreb*. (Cekkonto : Cradska Stedisnica Zagreb, 406-606/I br 46 53).

Jarabono : 330 dinaroj.

NORVEGA : Erling HOLTEN, *Leangen i Strinda*.

Jarabono : 8,50 kronoj.

SOVET-UNIA : Roberto DVORKIN, Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, *Leningrad*, 22, Kirovskij 42.

SUOMA : Joel VILKKI, *Somero*, poŝtkonto : Tu 60 253.

Jarabono : 300 suomaj markoj.

SVEDA : « *Eldona Societo Esperanto* », Box 19071, *Stockholm* (Poŝtĉeka Konto : 578).


Jarabono : 6 kronoj.

USONA : Jarvis E. BUSH, 3.700 North 75-th Street, *Milwaukee* 16, Wisconsin.

\*\*\*

ALIAJ LANDOJ : Sin turni al nia administranto : E. BIDOIT, 6 rue de la Paix, *Baugé* (M-et-L.) Francio. (Poŝtĉeka konto : 143-867 *Nantes*). Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn. Jarabono : 400 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

Ni daŭre serĉas perantojn.



# La Esperantista Kulturdomo

Kastelo « GRÉSILLON »  
BAUGÉ (M.-et-L.) Francio

Tél. 34

## FRANCA KULTURDOMO

### *Restadoj dum somero 1957*

La Kastelo Grésillon estos malfermita de la 1-a de Junio ĝis la 14-a de Septembro 1957.

**1-a Periodo :** 1-an de Junio — 14-an de Julio

Kursoj de Esperanto por komencantoj — Instruado de amatora bindarto  
Turismaj karavanoj

**2-a Periodo :** 14-an de Julio — 24-an de Julio

*Sensacia Manifestacio :*

*Kulturaj Internaciaj Ferioj*

Kun Profesoroj AULD, LAPENNA, WARINGHIEN,  
Dro ALBAULT kaj Ing. WATIER

**3-a Periodo :** 25-an de Julio — 10-an de Aŭgusto

*La Franca Lingvo*

por alilandaj samideanoj

Eksterordinare bona metodo por instrui rapide la francan lingvon pere de Esperanto, kursoj por komencantoj kaj por perefktigemuloj. Necesas uzi sufiĉe bone Esperanton.

**4-a Periodo :** 10-an de Aŭgusto — 31-an de Aŭgusto

*Somera Lernejo* - Tri kursoj de Esperanto

**5-a Periodo :** 1-an de Septembro — 14-an de Septembro

*Fakaj Renkontiĝoj* - Liberaj Ferioj